

Paulo Silas (Brazilo)



Mi ne certis

Mi ne certas, kiu estis la viro en la spegulo.

Mi ne certis.

En lia rigardo, mi rigardis.

Li ne havis nomon kaj la mian mi ofertis,

sed lia senŝanĝa rigardo estis neo.

Por la universo, mi ne trovis fundamenton en lia
okulbrilo.

Urĝis en mi la deziro diri, konfidi per palpebrumo,
ke la mondo pulsas ĉirkaŭe, dum ni interrigardis.

Mi volis atentigi,

krii el interne de la abisma distanco inter ni,

mi volis vorton ĵeti kaj averti,

ka la akvo jam atingis la mentonon.

El miaj intimaj bezonoj la plej grandan mi ardis
donaci.

Helpi lin mi volis kiel lastan antaŭenpuŝon.

Mi ĵuris per ĉiuj ebloj, probabloj, konjektoj,

hipotezoj,

sed ne utilis miaj provoj.

En lia silento mi silentis.

24-04-2016

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Estu lumo!

Heredantoj de l' Lumo,
jen ni feliĉaj, tamen,
dancantaj en la mallumo
de nia malsaĝeco.

Ni avidas je l' ombro
vanta de l' aplaŭdoj
nutranta la famon,
kiu nin trompas,
kaj forpasas.

Lumiĝi bezonas
la senmova animo,
dum estas tempo:
ĉar nur la lumo
ne korupteblas!

Juiz de Fora, 20/09/2018.

Rapsodio

Kvinjara knabino
feliĉon balancas
sur ŝnuro ligita
al du arabaj branĉoj.

Sed ŝi ne suspektas
pri nepra ŝnurego:
kvindekjara ino,
pont' super abismo.



La knabino feliĉas
pro la momento pura;
tamen ŝi malkonfidas
al l' abismo el plumoj.

Kaj ŝi teksas kaj malteksas
la silkon de l' temprivero,
kiu eterne revenas...

La virino kvindekjara
la vivspegulon transiras,
kaj kun kaos' dialogas.

Sed ŝi nur sukcesas trinki
de l' tago l' okulon bluan,
sub la printempa suno...

Juiz de Fora, 09/10/2018

Tiberio Madonna (Italujo)



AŬTUNO VERDA

Sur la aleoj
tegitaj per tapiŝo
farita el foliaro
friska blovo aŭtuna
reportas mian menson
al la nuntempo
al la koloroj de l' hodiaŭo
deturnante min de la pensoj
pasantaj
de la koloroj de l' hieraŭo:
ruĝo, flavo, hela bluo...
ĉi-somere la brilaj koloroj
sur papilioj, sur floroj,
sur folioj zorge farbitaj
per bela verd' intensa
gajigis la paŝojn
sur ĉi samaj aleoj
invitante nin danci;
la lingvo de l' naturo
kiu invitas ami
estas lingvo universala
ia "Esperanto flaŭra"
kiun ĉiuj komprenas
ĉiuj popoloj
de l' mondo;
kaj la folioj de l' platanaj

kiuj susuris ĉe la brizo
verdaj kaj steloformaj
kun siaj kvin pintoj
vere memorigas al mi
ja multe
la stelon de Esperanto
la stelon verdan
kiu unuigas
ĉiujn popolojn
de l' mondo.
Ĉiuj tiuj steloj
kiuj nin rigardis
ĉi-somere
de la platanaj branĉoj
montris gajaj en la sunlumo
sian intensan koloron
sian intensan verdon.
Nun
en aŭtuno
bruniĝintaj la folioj
estas ĉiuj jam falintaj
kaj kraketas sub la paŝoj
kiuj komencas tristiĝi
lantiĝi
mediti...
jen la diferenco
inter la platanaj folioj
kaj la stelo de Esperanto:
dum tiuj estas jam brunaj,
pale flavaj, ruĝetaj
kaj falintaj sur la ŝtonojn
donante rendevuon
por la venonta printempo,
la stelo de Esperanto
ĉiam verdas, ĉiam vivas,
montras sian koloron neŝanĝita
sian verdon originan
vivan kaj brilan
kiu refarbas la tristecon
ĉiam varmigis nian koron
kaj diras nian ĝojon
per la sama vorto «ĝojo»
al ĉiuj popoloj de l' mondo,
disvastigante ĝin libere;

kaj tiel, per Esperanto,
nia aŭtuno ja estas
ankoraŭ
verda.

Vejdo (Ĉinujo)



Odo al aŭtunaj koloroj

La vento aŭtuna eksvingas per farboj
penikon ŝmiradas naturon plenforte.
Diversajn kolorojn prezentas jen arboj,
plantaĵoj, riveroj kaj floroj komforte.

La noktan mallumon dispelas aŭroro.
Jen ludas sur fono lazura ĉiela
laktblankaj nubmasoj tremvibre en foro,
glitante, flosante ja kiel ŝafaro fabela.

Sur transa deklivo de l' val' en prospero
diantoj disfloras en flava nuanco.
Svingiĝas ilia kapet' en libero
flirtante kun vento kvazaŭe en danco.

Montsupre sin sternas oranĝa la vasto
da persimonarboj punktitaĵoj en verdo.
La fruktoj maturas vere en kontrasto
al verdaj folioj cedante ne al konkur-perdo.

Cipresoj sin montras inkverdaj des plie,
verŝajne sin pretigi envintre rezisti



Mori (Usono)



Aforisme (36)

Unu egalas al unu
en matematiko
sed ne egalas
en politiko.

Vivi

sen sufiĉe da mono
estas kiel vivi
en prizono.

Kiam homoj kunvivas
pace kiel kolomboj
superfluas armiloj
kaj bomboj.

La plej granda
problemo

la neĝan atakon kaj strebe defie
rigoron malvarman por vive ekzisti.

Lavendo sin vestis viole purpura,
moleta kaj freŝa ja kiel vil-plena
tapiŝo farita el tuko velura
rebrile per gam' de violo solena.

En kampoj sorgplantoj kun spikoj skarlataj
skuiĝas leĝere kaj klinas sin pro kap-pezo.
Je blovo de vento aŭdiĝas ventbataj
susuroj por sona orela aprezo.

Kotonkampoj regalas okulojn per blanko
en verdaj foiloj — ja vere mantelo
kun fono smeralda sub puro sen manko,
simile al vasta stelplena ĉielo.

Orflavaj ondetoj nun ludas leĝere
rizkampe sub arda sunluma zorgemo,
leviĝas kaj sinkas rizspikoj espere
al riĉa rikolto kun ĝoja poemo.

Do, kiu kolor' plej elstaras aŭtune?
Kunplektas la buntan vidaĵon naturo
per ĉiaj koloroj kombine jen nune —
festen' por okuloj pri plena maturo!



estas tiu de
la soleca homo.

Grandas la diferenco
Inter gvidanto
kiu servas sian popolon
kiel saĝa patrioto,
kaj tiu, kiu sekvas
propran volon,
kiel stulta despoto.

Neniu krom homvizaĝa lupo aŭ homo ruza kiel vulpo kunfestas ĉe la tablo de lupo. ***	ju pli bonfara estas despli valora. *** Homo sen potenca menso estas homo sen potenco. ***	pri viaj problemoj aktivas, la problemoj en via vivo plu vivas. *** Ĉu bela, ĉu malbela Nia penso fariĝas reala. ***
Ju pli potenca via penso despli granda via potenco. ***	En ĉiuj homoj estas konstanta batalo Inter bela anĝelo kaj sovaĝa animalo. ***	Senvalora persono sur la plej alta posteno ankoraŭ estas senvalora persono. ***
Idioto per sia voĉdono agas kontraŭ propra bono. ***	En amikeco estu kiel ĉevalo ne forlasu amikon meze de la batalo. ***	Vulpo estas vulpo lupo estas lupo sed homo povas esti kaj lupo kaj vulpo. ***
La plej malfeliĉaj patriotoj estas tiuj sub l' gvido de despotoj kaj idiotoj. ***	Frukto de pomarbo ĉiam kaj ĉie estas pomo, sed ido de lia moŝto Homo Foje estas lupo, Foje vulpo Foje ŝafo kaj Foje homo. ***	Homo estas la ununura animalo kiu batalas sen natura kialo. *** Se besto batalas por manĝaĵo homoj interbatalas pro manko de saĝo. ***
Kie ĉiu homo zorgas pri komunaj feliĉo kaj prospero tie estas paradizo sur la tero. ***	Dio estas kaj vestas sin bele sed kondutas krude kaj kruele. ***	Granda homo estas ne tiu, kun granda potenco, sed homo kun afabla koro kaj granda penso. ***
Dio estas konscio en vi, en mi, en ĉio. ***	Ve al ĝangalo, kie anstataŭ leono, hieno prezidas sur la trono. ***	Ju pli multe da stultaj homoj, despli abundas soci-politikaj problemoj.
Kapoj plenplena je multe da nenio ofte havas potencon decidi pri ĉio. ***	Niaj kritikoj pri aliaj uloj estas reflektado de niaj propraj makuloj. ***	Dum ĉiu homo zorgas nur pri sia batalo homaro vivas en sova ĝangalo. ***
Nur per mezuriloj : Mono kaj Posteno eblas mezuri karakteron de ĉiu persono. ***	Homo Dum via penso	

Zorgi pri komuna prospero
estas la plej sankta afero.

Kiam ĉiu homo zorgas
pri bonfarto de l' ceteraj homoj
la mondo estas
sen grandaj problemoj.

Estu kiel granda maro
sen zorgo pri
prijuĝo de homaro.

Kio estas la diferenco
inter indifera persono
kaj ŝtono?

Nu, la dua pli utilas
ol indifera persono.

Dum ekzistas
egoistaj idiotoj
ekzistas diktatoroj
kaj despotoj.

Kiel guto de akvo
en la maro
sorto de unu homo
dependas de l' homaro.

Idiotoj kiuj staras
malantaŭ stulta despoto,
meritas la suferojn
de sia malfeliĉa sorto.

La diferenco

Inter animalo kaj homo
ne pli grandas ol nomo.

Reganto kiu sekvas
sian propran volon
neniel povas servi
sian popolon.

TiuT kiu amas Dion
devas ami ĉion.

Potencigu aĉulon
per posten' kaj glavo,
poste vi devas servi
lin kiel sklavo.

Jado (Ĉinujo)



Forgesu min

Forgesu mian humoraĉon
lasintan jam en via sino larĝa;
Forgesu mian seksallogon
florintan en soleca nokto via;
Forgesu mian petolemon
brilintan en okuloj mildaj viaj.

Pepante al vi,
mi feliĉiĝis;
Paŭtante je vi,
mi ekmielis;
Man-tenate de vi,
mi ekradiis;
Okulumante al vi,
mi raviĝis;
kuŝante ĉe vi,
mi ebriiĝas.

Mi iam sentis min feliĉa
Mi fakte estis ja erara,

ke mi en sezon' malĝusta
renkontiĝis kun malĝusta vi.
Kvankam vi tion neas,
la diro tamen veras.

Esti trezor' en via mano
mi deziris;
Resti virineto apud vi
mi esperis;
Miaŭi kiel katid' sur via gambo
mi vere ŝatis;
Naĝi kiel fiŝ' en via mar' profunda
mi ja tre volis.

Ĉio ĉi estas sonĝo fantazia,
sonĝe maren vi alnaĝus.
Se manon mian peti vi alvenus.
Kaj mi vin tuj kontentigus.

Se dum la tuta vivo ni pariĝus kiel
geedzoj,
Ĉu en la tuta mondo ni estiĝus
la plejplej dolĉa kaj miela paro?!

Vi ofte diris:
profite de la sereno de la vivo,

ni vivu gaje kaj senĝene kiel feoj.
 Ni dume atenteme pentru la pentraĵon
 per la komuna kunvivado,
 sur kiu estas afablec' kaj obstineco,
 ĝojo kaj trist', trankvilo kaj zorgemo.
 En desegnaĵoj mi ĉiame estas via ĝoja
 ĉarmulino.

Vi ofte diris:
 Ĉu ni ne enspiru,
 sciante l' aeron kun bakterioj?
 Ĉu ni ne trinku,
 sciante l' akvon kun mikroboj?
 Ĉu ni ne vivu,
 sciante vivon kun temp-limo.
 Ha, via absurdaĵo, simpla trompo!
 Sed kelkaj sonĝoj kaj deziroj
 neniam ja realigeblus.

Lasu do, l' estint' eksvalidiĝu!
 Vin mi ne ĝenos plu.
 En via mondo mi ne plu aperos,
 Nek la telefonvokoj kaj mesaĝoj,
 la zorgoj, riproĉetoj.
 Kiel agrable por mi nun,
 ke ĉion mi senkaŝe konfesis al vi.
 Vi vekigis, vidis, komprenigis, kaj eĉ
 kortuŝigis,
 sed miaflanke, mi decidis, do, foriri de vi.

Pro l'estonteco senfutura,
 foriri iu estas destinita morna,
 Se estas tiel,
 preferas mi tion fari, sed ne vi...
 Jen, amo aŭ ne-amo jam ne gravas,
 konfido aŭ perfido ankaŭ sensignifas.
 Kiu komprenas amon alies profunde?
 Kiu komprenas la tristecon de alies
 foriro?

Ni iam diskutis pri l' feliĉo,
 fakte, ĉiu el ni estas feliĉa,
 Nur tia, ke via feliĉo
 reflektas en okulo mia.

En la homa vivo
 ĉiam ekzistas sekret' neeldirebla,
 bedaŭro neŝanĝebla, sonĝo nerealigebla,
 Kaj ankaŭ troviĝas l' am' neforgesebla.
 Vi eble povus esti arkpafita de Kupid'
 multfoje,
 Sed tamen nur sola homo povus vin ridigi
 pli brile,
 plorigi pli kortuŝe,
 sopirigi pli profunde.

Efektive,
 la plej bela vojaĝo ne inkludas ĉiujn
 pejzaĝojn,
 sed la realo estas: kie ajn mi troviĝas,
 aperas vi en mian koron,
 kaj al vi mi sopiras.



Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Trapikas aŭror'
 l'arbaron en blua maten'.
 Spiro de suno.




Ĉambro plafona.
 Sur la fenestro steloj.
 Sobra sunleviĝ'.



Frostiĝinta paser'
 sur la fenestro frapas.
 Ĵetita paner'.



Trapasas la nokt' –
 ekbrilas la fajrujo.
 L'animo nuda.



Haicjo (Ĉinujo)



OMBRELO

Norduloj ne emas uzadi ombrelon
 Ĉar norda ĉielo ne emas eklarmi
 La norda ĉielo 'tas viro en vero
 Se eĉ en malĝojo, kriegas, li nur de kolero
 Norduloj deziras vojaĝi al sudo
 Rigardi: la suda ĉielo eklarmas
 Kaj kiel suduloj uzadas ombrelon
 Por forte subteni senlarman
 malgrandan spac-teron

Mi ploras

Mi nun ploras por vi,
 blanka kolombet'.

Ĉu vi vere kuŝas
 tombe en kviet'?

Iam mi ja ĝojis
 pro viaj plumbriĵ',
 alta ĉirkaŭflugo,
 bela, dolĉa tril'.

Iam ni atendis
 longe kun korŝir'
 vian resaniĝon
 el almorta ir'.

Mi ja nur bedaŭras
 mankon for de mi,
 ne plu en l' arbaro
 de verd-harmoni'.

El Ĉina Antikva Poezio

Ye Shaoweng (? - ?)

Malsukcesa vizito al ĝardeno

La mastro eble gardas muskejon de fuŝtretoj,
 mi do ne povas ovri l' verg-pordon per frapetoj.
 Ne printemp-belon povas enfermi la ĝarden',
 mur-eĝe pavas ruĝa abrikot-frond' sen cedo.

senĝena. Konus ja l' aliaj
 nenion, eĉ se mi klarigus
 la pepon. Do kun la vinkruĉo
 kaj irbastono, mi preferas
 ermiti monten nun por fuĝo.

Li Bai (701 - 762)

Gastado dum vojaĝo

En urb' min logas vina bonodoro
 en jada vazo kun sukcenkoloro.
 Se ebrigos maestr' min kiel gaston,
 mi ne hejmeon kovus en la koro.

Du Fu (712 - 770)

Okazaj pensoj

Afliktas min river' de printempo velkoranda,
 Mi staras irbastone sur benko floro-planta.
 Freneze flirtas flokoj salikaj en vent-danco,
 Frivolaj persikfloroj drivas laŭ akv' fluanta.

Liu Jisun (1033 - 1092)

Subskribo sur la ekranon

Hirundoj pepas sur la laboj.
 Allogas ilin temoj kiaj?
 Min ili vekis el la sonĝo

Liu Yuxi (772 – 842)

Spekto al persikfloroj en la Taŭista templo Xuanduguan

De stratoj terpoveroj leviĝas al vizaĝo,
 Revenas gaje ĉiuj homoj el florpejzaĝo.
 Mil persikarboj en la taŭista templo,
 Post mia degradiĝo, plantiĝis por vid-plaĉo.

Revizito al la taŭista templo Xuanduguan

La korton de cent muoj en la templo
Musko duonekovras
La floroj kolzaj floroj, anstataŭ la persikaj
disflure pompe sin ovras.
Sed kien la taŭistoj, kiuj plantis
la persikarbojn, iris?
Denove mi, vipata de la sorto,
Ĉi-tien min altiras.

Wei Yingwu (737 - 786)

La okcidenta roĝo en Chuzhou

Verdaj herboj mutas ĉe la fluo;
Inter densaj arboj orioleoj
Supre trilas hele kaj en bruo –
Ĉi pejzaĝoj, kiel ja idoloj,
Plaĉas al mi.

La printempa tajdo altorentas,
Kaj tuj urĝas pluvo je vespero.
La dezerta pramejo silentas,
Nur boat' sur roĝo, laŭ libero,
Flosas kun si.

Su Shi (1037 – 1101)

La ombro de floroj



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKSESA

Kulturado de la denaska naturo

§16-01

Tiuj, kiuj kulturadas sian denaskan naturon per

La ombro amase ascendas sur la ŝtonperonon
de l' bela kiosko. Ĝi estas tiel nigre densa,
ke la servoknab' ne sukcesis — kelkfoje ordonon
mi faris — balai ĝin for, eĉ per peno intensa.
Apenaŭ reprenis la petolemaĵon la suno,
Jam, neatendite, tuje ĝin resendadas la luno.

Wang Anshi (1021 - 1086)

Bei-monto

Bei-monto portas verdon al l' akvoj kiuj tajdas,
En lagoj kaj riveroj smeraldaj ondoj saltas.
Mi sidas tiel longe por florojn zorge nombri;
Por serĉi belajn herbojn rehejmiĝi mi tardas.

Xu Yuanjie (1196? - 1245)

Sur la lago

Sur arboj ruĝafloraj la orioleoj trilas,
Super herbej' kaj lago ardeoj pace giras.
Kun koro ĝojhumora, en krepusko serena,
La homoj, en flutsonoj, remante hejmeniras.
elĉinigi



Minosun (Ĉinuĵo)

vulgaraj studoj, kun la vana espero revenigi ĝin al la
origina stato, kaj tiuj, kiuj reguligas siajn dezirojn per
vulgaraj konceptoj, kun la vana espero perfektigi per
tio sian inteligentecon, povas esti nomataj homoj
blindaj kaj malkleraj.

La antikvuloj, kiuj sekvis la Taŭon, nutris sian
inteligentecon per kvieteco. Ili estis inteligentaj, sed
ili sin detenis uzi sian inteligentecon. Ili povas esti
nomataj homoj, kiuj kulturadas sian kvietecon per sia
inteligenteco. Kiam la inteligenteco kaj la kvieteco
nutras unu la alian, la harmonio kaj la ordo eliĝas el
ilia naturo. La virto estas la enkorpiĝo de la harmonio,
kaj la Taŭo estas la enkorpiĝo de la ordo. El la virto en
perfekta harmonio venas la humaneco; el la Taŭo en
perfekta ordo venas la justeco; el la justeco en

perfekta juĝo kaj el la sincereco venas la lojaleco; tio, kio venas el la simpla kaj honesta koro reflektanta la denaskan naturon, estas la muziko; tio, kio venas el la bonfido kaj la deca konduto, estas la rito. Kiam la muziko kaj la rito estas disvastigataj en malĝusta maniero, ĉio en la mondo falos en malordon. Se ĉiu homo korektas sin mem kaj tenas sian virton en si mem, lia virto ne etendiĝos al aliaj; alie, ĝi ofendos aliajn kaj ĉio en la mondo perdos sian propran naturon.

§16-02

En siaj senklereco kaj simpleco la antikvuloj ĉiuj estis kvietaj kaj trankvilaj. Tiutempe la jino kaj la jango estis en harmonio kaj ekvilibro, la fantomoj kaj spiritoj faris nenian malordon, la kvar sezonoj sin sekvis regule, neniu el la estaĵoj ricevis malutilon, ĉiuj vivuloj vivis sian plenan vivdaŭron, kaj la homoj, kvankam naturdotitaj per inteligenteco, tamen havis nenian okazon por ĝin uzi. Tio estis la epoko de perfekta unueco inter la homoj kaj la naturo. Tiutempe la homoj faris nenion krom sekvi la naturan evoluon de la estaĵoj.

Kun la tempo la virto iom post iom degeneris kaj dekadencis. Kiam la suverenoj Suiren kaj Fuxi komencis regi super la mondo, ili sekvis la volon kaj la sentojn de la popolo kaj tiel ne plu konservis la perfektan unuecon inter la homoj kaj la naturo. Kiam la suvereno Shennong kaj Flava Imperiestro komencis regi super la mondo, ili atingis la stabilecon sed ne plu sekvis la volon kaj la sentojn de la popolo.

La virto plu degeneris kaj dekadencis. Kiam la reĝo Yao kaj la reĝo Shun komencis regi super la mondo, ili enkondukis sistemojn de regado kaj klerigado kun la rezulto, ke la pureco estis makulita kaj la simpleco estis difektita. Ili forlasis la Taŭon por instigi la popolon al bonfaroj, kaj neglektis la virton por instigi al bonkondukado, tiel ke la popolo ignoris sian denaskan naturon kaj sekvis nur siajn proprajn dezirojn. Kiam la homoj komencis sondi al si la koron reciproke, la mondo ne plu povis esti tenata en ordo. Pli poste la ritoj estis enkondukitaj kaj la vulgaraĵoj studoj estis akcelataj. La antaŭa superbrilis la denaskan naturon kaj la lasta dronigis la menson. Rezulte de tio, la popolo komencis konfuziĝi kaj

estiĝis malordo, tiel ke neniu povis retrovi sian denaskan naturon kaj reakiri siajn originajn purecon kaj simplecon.

El la ĉi-supra ni povas vidi, ke la mondo ne plu sekvas la Taŭon, kaj la Taŭo ne plu regas en la mondo. Kiam la mondo kaj la Taŭo sin perdis reciproke, la Taŭo ne povas revenigi la mondon al sia origina naturo, nek la mondo povas sin revigligi per la Taŭo. Tiuokaze la saĝulo, eĉ se li ne vivas en la monta arbaro, ne plu havas influon sur la mondo, ĉar lia virto estas kovrita kaj dronas jam en forgeso.

La tiel nomataj ermitoj en la antikveco ne izolis sin por apartiĝi de la mondo; ili ne fermis sian buŝon por gardi silenton; ili ne kaŝis sian saĝecon por ĝin konservi en si. Ili faris sin ermitoj, ĉar ili vivis en malfavora tempo. Kiam la tempo estis favora kaj ili povis fari grandajn agojn, ili revenis al la stato de la perfekta unueco sen lasi postsignojn percepteblajn. Kiam la tempo estis malfavora por ili kaj ili trovis sin en malfacila situacio, ili kaŝiĝis kaj vivis kun atendo en perfekta kvieteco. Tio estas la maniero por sinkonservo.

Tiuj, kiuj sciis konservi sin en la antikveco, ne ornamis sian inteligenteco per elokventeco; ili ne embarasis la mondon per sia inteligenteco, nek penis perfektigi sian inteligenteco. Unuvorte, ili vivis en siaj konvenaj lokoj kaj revenis al sia denaska naturo. Tiuokaze, kio alia do estis por ili fareda? La Taŭo ne signifas tiajn etajn aferojn, kiaj estas la humaneco kaj la justeco, nek la virto signifas tiajn etajn sciojn, kia estas la distingo de pravo kaj malpravo. Etaj scioj difektas la virton kaj etaj agoj difektas la Taŭon. Jen kial oni diras: “La sinkorektado estas ĉio, kion vi devas fari.”

§16-03

Tiu, kiu trovas plezuron en la gardado de sia denaska naturo, estas feliĉa. Tia feliĉo estas nomata “plenumo de ambicio”. La “plenumo de ambicio” de la antikvuloj ne signifis akiri altajn regnificistajn rangojn, sed ĝui senfinan plezuron. La “plenumo de ambicio” de la nuntempuloj signifas akiri altajn regnificistajn rangojn. La alta posteno estas ne parto de via denaska naturo, sed io ekstera, kio hazarde venas kaj estas portempe deponita ĉe vi. Vi ne povas

vin gardi kontraŭ ĝia veno, nek malebligi ĝian foriron. Tial ne ŝvelu de fiero tiam, kiam vi ekhavas altan postenon, nek deprimiĝu kaj egaligu vin al la vulgara mondo tiam, kiam vi estas en mizero. Se vi trovas la saman plezuron en la du situacioj, vi estos libera de zorgoj kaj maltrankvilo. Se vi sentas malplezuron tiam, kiam vi perdas ion, kion vi akiris al vi, tio signifas, ke la plezuro, kiun vi havis, venis el via malordigita koro. Tial, kiel oni diras, “Tiuj, kiuj perdas sin mem en sia ĉasado de io, kaj tiuj, kiuj perdas sian denaskan naturon sub la influo de la vulgara mondo, povas esti nomataj homoj, kiuj jungas la bovon malantaŭ la plugilon.”

Elĉinigiŝ



Wang Chongfang (Ĉinujo)

Ĉineske

Eto (Ĉinujo)

Floro en vazo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

En
vazo flor' kun malĝoj-plen'
lamentas
pri sia ĉagren'.

Kun
radikoj en vaz-brakum'
mi kreskas
en farita hum'.

Al
mi ja mankas sunvual',
kun vangoj
en velkinta pal'.

En

malhela koridor' jen
mi spiras
kun malĝojmien'.

Pro
akvomanko, varmo tro
konsumas
forton. Kion do?

El
koro mi sub la ĉiel'
ja volas
vivi en lumhel'.

Sed
mastro insistas sen ced'
min flegas
en la ĉambra bed'.

Ve!
Iam mi senvive tre
treniĝas
ĝis fina pere'.



**Deskses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Yanke (Ĉinujo)

Drakboata konkurso

—laŭ ĉinesko Busuanzi*

Boatoj vicas
ĉe startlinio
por konkurso intensa
kun energio.+

Je gong-signalo
sonas ĝojkrio.
La spektantoj aplaudas
jen kun pasio.

Kiel navedoj
boatoj glite
veturas sur rivero.
Vere ekscite

konkurso iras
al ondoj spite.
Ovacio eksplodas
ja ĝiszenite!

2018.06.18

Infanoj en militfajro

—laŭ ĉinesko Busuanzi*
Ja furiozas
krima milito
minace en la mondo
jen sen invito.

Domoj disfalas
kun tera glito.
Nur ruinoj diable
kuŝas kun spito.

Infanoj sen hejm’
malsate kun kri’
ĝemas kaj ploras triste
en mort-agoni’.

Ĉion jam perdis
eĉ sen famili’,
kompatindaj idoj, ve,
vivas en Siri’.

2018-06-14

* ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 55,75 silaboj kun duona rimo.

Fernando Pita (Brazilo)

Novelaro kiu rekonstruas sian aŭtoron

Ĉiu Literaturo – kaj la esperanta neniel esceptas tiun regulon – prezentas aŭtorojn laŭ diversaj niveloj:

interalie estas tiuj, kiuj skribas furoran kaj revolucion libron... kaj poste malaperas por ĉiam; estas tiuj, kiuj faktoj de ties privata vivo estas eĉ pli gravaj, kaj famaj, ol sia verkaro mem; kaj, inter diversaj aliaj kategorioj, estas tiuj kiuj, kvazaŭ masonistoj, fakte *konstruas* siajn verkojn. Tiel, brikon post briko ilia verkado evoluas, alportante al legantoj novajn elementojn. Tiuj aŭtoroj ja fariĝos grandaj, tamen ne pro unu aŭ du libroj, kaj certe ne pro sia personaj faroj: resume, estas ilia verkaro kiu devas esti zorgeme enkalkulata, ĉar ĉi-kaze la tuto pli grandas ol sumo de la partoj.

Tamen, tiu speco de aŭtoroj vivas ĉiam kun glavo pendanta sur iliaj kapoj: ĉar ilia verkaro kreskas senhalte tamen nur pogute, kaj en ili la novaj elementoj estas diskrete kaj eĉ kaŝe inkludigitaj, multaj homoj kutime diras ke “*la tekstoj de tiu ĉiam samas...*”

Kompreneble, tiu persono, precipe tiu eventuala leganto, kiu ne akompanas la tekstojn de la aŭtoro, ne kapablas tuj percepti tian evoluon, ĉar por tio ili devus aŭ legi ties tutan verkaron (afero preskaŭ nebla en nia esperanta medio) aŭ lupee kompari verkojn de malsimilaj periodoj de tiu aŭtoro. Se iu ne tiom faras, oni riskas nejuste taksii aŭtorojn kaj/aŭ verkojn, kaj ĝuste tiu estas la kazo de *La viro el la pasinteco* kaj de sia aŭtoro, Julian Modest.

Aŭtoro vere produktema, tiu specifa titolo de Modest unuavide suferas el tiu problemo: krom liaj teatraĵoj, liaj mallongaj noveloj sentiĝas iom plataj, senagaj, kun kelkfoje longaj priskribadoj, malmultaj dialogoj kaj manko de sufiĉa profundeco – kaj tio ja furiozigas la verajn amantojn de literaturo! En ili mankas tiu kontinuecon, kaj ilin legante, oni ree sentas, ke la noveloj finiĝis iom antaŭtempe, kvazaŭ ili estus tekstoj en kiuj oni distranĉis la finan paĝon.

Ĝenerale oni ne donas novan ŝancon al tiaj verkistoj: oni flankenĵetas ties verkon kaj, pri la aŭtoro mem, oni nur memoras pri ne plu aĉeti libron de li skribita. Tamen, tio tute ne estas la kazo de Modest, unu el la plej gravaj romanistoj de nia lingvo, kaj aŭtoro kies verkaro (terura vortludo!) ja ne modestas. Plie, li estas aŭtoro kies historio igas lin

meritanta, almenaŭ, ke oni pripensu la kialojn laŭ kiuj, ĝuste tiu titolo donu al mi tiun gustumon.

Mi konfesas ke tio postulis al mi relegadon de la libro, kaj tion farinte mi pensas esti malkovrinta la trafan respondon al mia demando: en la noveloj mem estas nenia problemo! Fakte se iu legas ilin malrapide, ekzemple unu potage aŭ posemajne, tiu neniam sentos ian problemon. Tamen, ĉiu rakonto en la libro estas, en si mem, embrio(j) de tute aparta romano. Kunkudritaj, ili sekvus vojon similan al tiu de la argentinana verkisto Rodrigo Fresán: kvazaŭ mozaike, ĉiu rakonto estos ero el tuta granda romano, bedaŭrinde ankoraŭ ne verkita de Modest.

Tio al mi elmontras fakton tre bonaŭguran rilate al Modest: li nun sufiĉe maturiĝis kaj pretas verki grandan, longspiran romanon, kiu ja kronos ne nur sian ĝishodiaŭan verkaron, sed samtempe signalos novan en ĝi turnopunkton cele al pli alta kvalito. La konstruado de ties verkaro devas ja daŭri, sed kelkfoje la konstruaĵo mem indikas kien marŝi.

Kaj mi sincere esperas ke li baldaŭ verku tiun libron, ĉar la kontraŭo indikus, ke eble Modest suferas la “Borgesan sindromon”: tiu, kiu igis ke alia argentinano, la mondfama Jorge Luis Borges, neniam verkus romanon, ĉar li ne kredis ke tio estis necesa por ke li prezentu al la mondo grandajn verkojn. Bone, mi pensas ke unu el la plej gravaj verkistoj de Esperantio simple ne povas argumenti tiamaniere, ne nur ĉar la mikroskopa esperantista legantaro ja bezonas lian produktadon, sed ankaŭ ĉar Modest montriĝas preta por pli larĝaj ekflugoj, kaj ni same pretas por konstati la novan brikon kiu fariĝos lian novan mejloŝtonon, kaj kiam tiu verko estos publikigata, tiam oni devos relegi, pli atenteme ol neniam, *La viro el la pasintecon*, por ke ni povos ja vidi kiamaniere tiu verko anticipas la novajn vojojn, kaj, - ne, kara leganto, la supra titolo ne enhavas eraron en la akuzativo – vere rekonstruas sian aŭtoron.

Wang Guozhen (1956-2015)

Mi ŝatas ekiri

Ĉiuj lokoj, kiujn mi jam atingis, apartenas al tiuj de hieraŭo. Kiel ajn verdaj la montoj estas, kiel ajn belaj

la riveroj, kiel ajn mildaj la ventoj, la forta alkroĉiĝemo al ili fariĝas katenoj, kiuj ĉenas ne nur la piedojn, sed ankaŭ la estontecon.

Kiel mi ne povus ŝati ekiri? Se vi ne vidis la imponecon de la montoj, tio vere estas bedaŭro; se vi vidis la imponecon de la montoj, sed ne la senlimecon de la maroj, tio ankaŭ estas bedaŭro; se vi vidis la senlimecon de la maroj, sed ne la vastecon de la dezertoj, tio ankoraŭ restas bedaŭro; se vi vidis la vastecon de la dezertoj, sed ne la misterojn en la arbaroj, tio ankaŭ lasas bedaŭron al vi. Tra la mondo sin trovas sennombraj pejzaĝoj, sed mi havas nemaljuniĝontan koron.

Nature mi scias, ke troviĝas malebenaĵoj en la montoj, huloj en la maroj, sabloventoj en la dezertoj kaj ferocaj bestoj en la arbaroj. Eĉ se tiel, mi ankoraŭ ŝatas tion. Rompi la kvieton de la vivo prezentas alian panoramon, kiu apartenas al junuloj. Feliĉe mi ankoraŭ ne maljunas. Eĉ se mi estus maljuna, kio gravas? Ĉu oni ne diris, ke eĉ maljunuloj devas disvolvi pli da vigleco?

Do mi volas ellerni profundmensecon de la montoj, bravecon de la maroj, aplombecon de la dezertoj kaj sagacecon de la arbaroj. Mi ankoraŭ volas ellerni gustumi la buntan vivon de la homa mondo. Kiel malproksimen oni povas iri? Tiu demando estas elmetita ne al la piedoj, sed al la volo. Kiel alten oni povas grimpi? Tiu demando ne estas elmetita al la manoj, sed al la ambicio.

Pro tio mi volas starigi altan celon per mia varma sango, ne nur por akiri gloron, sed ankaŭ por ĉasi spiriton. Se la celo estos atingita, mi gajnos gloron, dum se la celo ne povos efektiviĝi, mia vivo fariĝos plena kaj riĉa pro mia peniga vojaĝado tra vento kaj pluvo. Mi konsideras, ke tio ne vanigos mian vivon. Jes, mi ŝatas ekiri, kaj mi esperas, ke ankaŭ vi.

elĉinigi

Vejdo (Ĉinujo)



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Retadreso: vejdo@163.com

www.elperno.cn/penlisto.htm

